

# Eŭropa Bulteno

Aŭgusto 2014, Numero 140

## SOMERA ESPERANTO-STUDADO EN NITRA



La 8-a Somera Esperanto Studado (SES) okazis inter la 12-a kaj la 20-a de julio 2014 en slovakaj urbo Nitra. Partoprenis 250 personoj el 29 landoj. Organizis ĝin sperta teamo de E@I, kiu ĉiujare aldonas ion novan. SES abundis per ĉiuspecaj programoj, tre diversaj prelegoj, laborejoj, sportaj eventoj kaj konkursoj, kvizoj, kulturamuzaj kocertoj kaj nokta amuzado. Sed kiel kutime la centra kaj la plej valora programparto estas la antaŭtagmezaj studadoj. Per tio SES diferencigas de aliaj kutimaj E- aranĝoj: ĉiutage okazas lernado inter la 9-a kaj 13-a horo je ĉiuj niveloj. La puraj komencantoj ne estas testataj, sed aliajn oni testas komence kaj difinas ilian nivelon, do kurson al kiu ili iru. SES ĉiujare invitas spertajn kaj kvalifikitajn instruistojn por ĉiuj niveloj, de A1 ĝis C1 kaj ĉi-jare estis enkondukita plia nivelo: literatura kurso por tiuj kiuj lingve jam tre kvalitas sed volas lerni pri originala E-literaturo. Mi ĉiam denove miras ke la partoprenantoj tre disciplinite venas al la kursoj kaj matene oni ne vidas homojn kiuj sen ion fari vagas tra la ejoj kaj korto.

Kiel en aliaj aranĝoj ankaŭ SES havas mezan tagon dediĉitan nur al tuttagaj ekskursoj sed ankaŭ en aliaj tagoj eblas elekti plurajn posttagmezajn duontagajn ekskursojn. Mi ne prezentos ĉi tie detalojn de tre abunda programo ĉiuspeca (oni konsultu pri tio enretan SES-programlibron). Mi nur diru ke ĉiu povis trovi ion interesan por si dum la posttagmezoj kaj

ke la vesperaj koncertoj estis altkvalitaj kaj profesiaj (krom la tro longa kaj teda internacia vespero).

Pri la lerna parto mi povas diri ke parolante kun kelkaj personoj kiuj vizitis diversajn kursojn, ili ĉiuj esprimis kontenton pri la kursgvidnatoj. Tial mi diru nur iom pri la porkomencantaj kursoj kie mi mem kontribuis.

Estis iom pli ol 20 personoj kiuj volis lerni E-on komplete de komenco kaj el ok landoj. Mi iom malfruis al la disdivido de la kursanoj kaj tial plimulto el ili aliĝis al la kurso de Stano Marček, kiu gvidas laŭ rekta metodo, laŭ mi malnovmetoda, dum kiu oni kolektive nur ripetas vortojn kaj frazojn kaj ne kapablas post la kurseto paroli memstare. Al mi venis 6 gekursanoj el 5 landoj (du slovakinoj, usonano, hungaro, katalunanino kaj serbo). La duan tagon alvenis du koreaninoj, sed ili ne povis enŝaltiĝi (ni jam faris unuan lecionon antaŭan tagon) kaj poste ne plu frekventis la kurson. Kiel konate, mi gvidas kurson laŭ la Zagreba metodo uzante la saman lernolibron en naciaj lingvoj de la partoprenantoj, kiuj mem legas gramatikajn klarigojn en sia lingvo kaj poste ni kune ekzercas per tre diversaj ekzercoj, ĉefe parolante. Dum la 6 plenaj lernotagoj (24 horoj) ni sukcesas tralabori 5 lecionojn kun la plej gravaj elementoj de E-gramatiko kaj uzante ĉirkaŭ 220 morfemojn. Fine mi faras kontrolteston (kiu principe ne estas deviga) por mem kontroli, kion mi atingis: ĉiu el la kursanoj devas dum 3 minutoj paroli antaŭ la klaso pri iu ĉiutaga temo el la kapo (ĉi-jara temo estis: Mia kurso). Kaj ĉiu diris minimume 10 aŭ eĉ ĝis 15 frazojn dum la tri minutoj, kio estas pli ol kontentiga. Dum la ĉi-jara SES mi vidis minimume 70% de ĉiuj miaj pasintjaraj lernantoj-komencantoj kiuj denove venis kaj vizitis pli superajn ŝtupojn. Tio ankaŭ montris ke mia laboro pasintjara estis sukcesa.



SES estas unu el malmultaj E-aranĝoj kiuj nuntempe ankoraŭ kreskas. Ĉi-jare okazis eĉ du SESoj (la dua estis en Moskvo fine de aŭgusto) kaj mi tre dezirus ke similajn aranĝojn komencu organizi ankaŭ aliaj. La 9-a SES okazos en Banska Bistrica (Slovakio) proksimume en similaj datoj meze de julio).

Zlatko Tišljar

## REEĤOJ PRI LA DEKA KONGRESO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO

### Impresoj de kongresanino

Estis belega kongreso en belega urbo ĉe la Adriatika Maro vidalvide al belegaj insuloj!



La LKK faris sian plejblon por organizi kune kun la Esperanto-Societo el Rijeka neforgeseblan eventon. Walter kaj mi tre dankas al ĉiuj organizantoj de tiu 10-a EEU-kongreso kaj specife al Zlatko kaj Maja pro ilia grandega laboro!

Pri la oficialaj partoj kaj la prelegoj vi jam ricevis

kompletan raporton en la Eŭropa Bulteno.

Mi nur intencas paroli pri la agrablaj travivaĵoj kiujn ni povis ĝui. Ĉiujn vesperojn okazis ĉu folkloraj dancoj, ĉu muzikaj prezentaĵoj, ĉu teatraĵoj. Kelkaj estis je tre alta nivelo kiel perkutistino Kaja kiu poste ricevis plurminutan strarantan aplaŭdon. Alia estis malgranda grupo el Zagrebo Druyd en kiu Dubravko Lapaine majstre ludis la tradician australian *didgeridoo*-n. Ni ankaŭ aŭskultis tenoron kiu kantis kelkajn popularajn operariojn.



Aparte sukcesa estis la ŝipa ekskurso al la insulo Krk. Ni manĝis survoje bonegan frostitan fiŝon. Unu el la ŝipistoj ludis akordeonon kaj la publiko gaje kunkantis la lokajn tradiciajn kanzonojn. La vizito de la urbeto donis al ni ideon pri la historio kaj la grava turista valoro de tiu insulo

[http://nl.wikipedia.org/wiki/Krk\\_\(eiland\)](http://nl.wikipedia.org/wiki/Krk_(eiland))

[http://fr.wikipedia.org/wiki/Krk\\_\(%C3%A4le\)](http://fr.wikipedia.org/wiki/Krk_(%C3%A4le))

Rijeka estas tre agrabla urbo kun belega urbocentro. Ni tre ŝatis la subtegmentan merkaton kie oni vendas ĉiujn manĝaĵojn: fromaĝojn kaj laktaĵojn, viandojn, fiŝojn kaj legomojn kaj fruktojn. Tie ni multfoje trinkis bonegan kafon! La promenadstrato Korzo estas plenplena de turistoj kaj lokanoj kiuj tie povas sidi kaj ripozi en la multaj terasoj. En tiu strato ni miris pri iu tabulo kie estis menciita ke en 1907 tie estis fondita la unua Esperanto-Klubo de Kroatio.

Rijeka estas haveno sed ankaŭ havas kelkajn plaĝojn. Mi naĝis en profunda blua akvo, sed ne alkiutimiĝis al la ŝtonetaj plaĝetoj surborde (mi loĝas en Oostende/Belgio kie larĝaj strandoj de fajna blonda sablo estas la feliĉo de la someraj turistoj).

Post la kongreso Rijekanoj invitis nin. Unue ni vizitis ilian *Esperanto-Domon* tutapude de la urbo. <https://hr-hr.facebook.com/Esperanto.domo>

<http://translate.google.com/translate?u=http%3A%2F%2Fwww.esperantodomo.net%2Fhostel>



[%2F&sl=hr&tl=en&hl=en&ie=UTF-8](#)

La Rijeka E-klubo estas je 70% posedanto de la bieno. Kune kun Skoltoj ili mastrumas belegan ferian domon kie 40 personoj povas loĝi. Estas ĉambroj kun pluraj litoj, kuirejetoj kun modernaj ekipaĵoj, modernaj duŝoj, sunaj terasoj, ktp. Teretaĝe estas kafejo kaj kunvenejoj. Vere estas revo por ĉiu E-asocio!

En broŝuro pri Rijeka mi legis ke tie estis konstruata, en pli alta parto de la urbo, fama moderna moskeo pagita far Emiro de Qatar (pli ol 10 milonoj da EUR !!!) <http://www.medzlis-rijeka.org/>. Ni decidis viziti ĝin, sed tie ni konstatis ke ĉio estas fermita pro la Ramadan! Do ni komencis ĉirkaŭiri la imponan konstruaĵon kaj iun momenton tra la fenestro ni vidis viron kiu gestis ke ĉio estas fermita. Mi ridetis kaj faris gestojn por viziti la moskeon. Surprizo: li malfermis la pordon kaj afable (li parolis neniun lingvon krom la kroatan kaj probable la araban) kun gestoj montris al ni ĉion! Pro la Ramadan ni komprenis ke la restoracio (tre luksa) malfermos la pordojn je la 20:00-a horo ĝis la 04:00-a matene. Por viziti la grandan salonon ni formetis niajn ŝuojn kaj mi devis surmeti vualon sur la kapo. Nekredeble kia lukso! Sed virinoj devas resti en la galerio je la unua etaĝo. Mi neniam vidis tian lukson kia ĉe la virinaj necesejoj (eĉ ne en kvin-stelaj hoteloj). Marmoro kaj brilaj kranjoj, lastmodernaj aparatoj... mi neniam vidis tion! En tiu moskeo oni ankaŭ organizas grandajn kongresojn. Sub la konstruaĵo estas grandega garaĝo, kaj ĉirkaŭ la moskeo venos belaj ĝardenoj, ĉio kun adaptitaj aparatoj por regula akvado. Estis belega tago!

Flory Witdoeck

## Kaŭzoj de malmultnombro



Pro mia artikolo rilata al la kongreso de EEU aperinta en Libera Folio okazis vigla reagado de legantoj pri la kaŭzoj de malmultnombro de kongresanoj lastatempe. El okdedo da reagoj mi povis konkludi proksimume la jenon:

La ĉefaj kaŭzoj por tiu foresto estas ŝanĝitaj cirkonstancoj en la interhoma komunikado kaj la ekonomia krizo.

Unua cirkonstanco kaŭzas ke

- La homoj ne plu emas iri al multekostaj kongresoj por renkonti amikojn, kiujn ili povas ĉiutage alparoli, eĉ renkonti per la modernaj teknikoj senpage.

- Ili ne emas iri al aranĝoj kiuj ne estas enhave interesaj, ĉar la homoj ĉiam pli emas al amuzoj kaj malpli da seriozaj „tedaĵoj“  
 - en kiuj ĉefe regas la metodo „ex catedra“, kie prelegas fakuloj kaj apenaŭ okazas diskutoj  
 La dua cirkonstanco kaŭzas ke oni ne emas vojaĝi malproksimen.

Kion devas fari organizantoj de konferencoj, kongresoj, renkontiĝoj, se ili volas adaptiĝi al tiuj novaj cirkonstancoj?

La kongresoj kaj aranĝoj devus

1. enhave esti multe pli amuzaj kaj allogaj por feriaj cirkonstancoj kaj la seriozaj programoj enhavu minimume da klasikaj prelegoj kaj kiel eble plej multajn debatajn rondojn kaj laborejojn.
2. por ke oni ne devu vojaĝi malproksimen, oni organizu pli da regionaj aranĝoj (kontinentaj kongresoj, regionaj konferencoj ktp.).

## Kiel modernigi lokan E-agadon

Dum la kunsido pri loka agado en la EEU-kongreso en Rijeka, la 11-an de junio oni prezentis jenajn novajn ideojn pri tio kiel riĉigi aŭ novigi la loknivelan agadon de E-societoj kaj kluboj:



1. Anton Mihelič prezentis spertojn de esperantistoj el Brežice en Slovenio. Ilia agado estas ligita al publikaj institucioj en malgrandaj urbetoj. Ili agas kadre de Literatura sekcio „Beseda“ ĉe Kulturdomo „Franc Bogovič“ en Dobova, kiu havas plurajn laborgrupojn laŭ iniciatoj kaj deziroj de lokaj civitanoj. Kadre de tiu publika instanco ili organizas informadon pri Esperanto (ne organizas kursojn, sed informkursetojn kun tuja aktivado en

grupo pri literaturo, pri teatro k.s). Ili do preparas literaturajn vesperojn dulingvajn por la loka publiko, skeĉojn dulingvajn kaj partoprenas en publikaj lokaj aranĝoj kiel kunvenoj okaze de festotagoj k.s. Ili tiusence daŭre informas pri sia agado lokajn informrimedojn, ĉefe elektronikajn kaj aperas multaj informoj per kiuj ili sukcese varbas novajn membrojn.

2. Ed Robertson el Skotlando informis pri agado en Edinburgo kiu povus esti ekzemplo bona por grandurboj. Nome en grandurboj kutime vivas pluraj esperantistoj el aliaj landoj. E-societo povas serĉi kaj trovi ilin kaj organizi komunajn renkontiĝojn en publikaj bierejoj kaj amuzejoj kie apud biero (aŭ viskio) oni povas prezenti eksterlandanojn kiuj diru ion pri siaj landoj ĉu publike interkonsente kun gastejestro ĉu simple en rondo de esperantistoj, kiun povas aŭdi aliaj gastoj.


3. Zlatko Tišljar prezentis interesan kunvenon de Esperantistoj en Berlina klubo kiuj okaze de eniro de Kroatio en EU aranĝis skype-kontakton inter la berlinaj klubanoj kaj du esperantistoj el Zagrebo kiuj rekte prelegis pri Kroatia E-movado kaj povis vive respondi al demandoj de la klubanoj. Interesa maniero uzi modernajn rimedojn ene de E-societoj.

4. Thierry Saladin proponis ke Esperantis-toj povas organizi surstratajn elmontrojn de Esperanto, irante grupe kun T-ĉemizoj reklamantaj Esperanton kaj portante banderolojn informantaj la lokan publikon pri eblo lerni E-on (ekzemple propagandante la portalon [lernu.net](http://lernu.net)).

5. Interesajn spertojn havis kelkaj urboj en Eŭropo pro alveno de bonaj esperantistoj el aliaj landoj. La movadon en iu pola urbo en lasta deko da jaroj esence plivigligis juna ruso kiu venis studi tien kaj enkondukis novajn metodojn kaj viglan reklamadon inter studentoj, la movadon en krizaj jaroj dum la naŭdekaj jaroj en Slovena urbo Maribor gvidis alveninto el Kroatio kaj estas kelkaj similaj ekzemploj. Eble por krizantaj societoj kiuj tamen havas monon aŭ ejojn estus solvo inviti iun junan aktivulon el malpli riĉa lando, ke tiu transprenu la lokan agadon.

Zlatko Tišljarić

## ANTAŬKONGRESO EN BIOGRAD NA MORU



La antaŭkongreso en Biograd na Moru en Dalmatio, lige al la ĉi-jara 10a EEU-kongreso en Rijeka, eble malpli grandis ol atendite (12 partoprenantoj, plus ĉeforganizanto David Rey Hudeček kaj gvidantino/interpretistino Judita Rey). Tamen kiel konate, grandeco nenion diras pri kvalito!

La vetero estis bonega tra la tuta antaŭkongreso. Post la unua vespermanĝo kaj

tranokto (en ŝanĝita tranoktejo, sed kun bela ĝardeno), dum la unua plena tago sekvis boatekskurso al la Kornati-insularo el 140 insuloj - 89 inter ili en nacia parko - kaj la natura parko Telaščica, kun impresaj rokaj klifoj kaj varma sala lago surinsula.

Dum alia tago sekvis busa ekskurso al historiaj urboj Trogir, romantik-gotika urbo sur rivera insulo kaj kun tradicia seninstrumenta kantado, kaj Split, kun la palaco de romia imperiestro Diokleciano. Survoje al tiuj urboj la buso i.a. preterveturis urbon Primošten (?), kie en la 1960aj jaroj troviĝis Internacia Esperanto-Kampadejo, kien iam venis multegaj Esperantistoj; estas nun esperoj rekrei aŭ reinstigi ion similan en Kroatio.

Eblis ankaŭ malkovri la urbon Biograd na Moru mem, plaĝumi, butikumi, gustumi la diversajn specojn da bongustaj glaciaĵoj (fakte la ĉirkaŭaĵo ofte memorigis je ekz. Italio aŭ Francio, nur kun pli pura mediteranea maro) kaj, en unu tago, sperti regionan merkaton kun varoj el diversaj kroatiaj regionoj.



Je la lasta tago de la antaŭkongreso, survoje al Rijeka, partoprenantoj povis viziti la belegajn lagojn de Plitvice, kun treege klara kaj ĉielblua akvo. Tiuj lagoj estas nacia parko kaj Monda Heredaĵo de UNESCO, kie krome estis filmitaj pluraj scenoj en filmoj pri indiano Winnetou (laŭ la libroj de germana aŭtoro Karl May). Apude eblis tagmanĝi en urbeto Kuterevo, kun la nura kroatia rifuĝejo por orfaj ursidoj.



La programo estis bone elektita kaj kapable plenumata. Sed eble eĉ pli impresis la ĉiama afableco kaj pacienco de la georganizantoj, ilia ĉiama preteco helpi kaj kiel eble plej rapide solvi ĉiajn ekaperantajn problemojn. Ekz. futbalemoj tiel ekhavis la eblecon spekti la kvaronfinalon de la Monda Ĉampionumo, Francio-Germanio (4a de julio), lige al la vespermanĝo; dum alia okazo aranĝiĝis en la kutima restoracio speciala bufedo kun miksitaj viandoj, nur por la partoprenantoj.

Entute, ĉio tio estis bela kaj memorinda elmonro de kroatia gastamo. Grandegan dankon al la georganizantoj!

Sandra Schweder

## OMBUDSMANO SENPOVA

Je la sama tago kiam mi ricevis la junian-julian numeron de 'Eŭropa Bulteno', kun artikolo de Germain Pirlot pri la 'Ĉiam pli klara intenco unulingvigi EU-on', per papera poŝto alvenis faldfolio de la eŭropa Ombudsmano<sup>1</sup> en kiu estas menciita rilata problemo.

La Eŭropa Komisiono regule organizas publikajn konsultadojn por ebligi al firmaoj, civitanoj, asocioj, kaj aliaj interesitoj partopreni en la EUa decidofara proceso. La mediaciisto pritraktis plendon de hispana advokato, ke la Komisiono aperigas la dokumentojn por multaj tiaj konsultadoj nur en la angla, kaj ke tia lingvopolitiko estas kontraŭa al la principoj de malfermiteco, bona administrado kaj ne-diskriminacio.

La mediaciisto enketis ne nur pri la manko de havebleco de dokumento en lingvoj aliaj ol la angla, sed ankaŭ pri la ĝenerala lingvopolitiko de la Komisiono rilate al publikaj konsultadoj. La enketado malkaŝis ke tre malmultaj publikaj konsultadoj estis elsenditaj en ĉiuj oficialaj lingvoj de EU. Pluraj konsultadoj celantaj la ĝeneralan publikon ekzistis nur en unu aŭ tre limigita nombro da lingvoj. La mediaciisto faris malneton de rekomendo al la Komisiono, sugestante ke ĝi publikigu ĉiujn konsultadojn en ĉiuj oficialaj lingvoj de EU, aŭ havigu al la

<sup>1</sup> Por tiu funkcio Vikipedio ankaŭ uzas 'rajtprotektanto'; Google sugestas 'mediaciisto'.

civitanoj tradukon laŭ peto. Li ankaŭ rekomendis, ke la Komisiono havu klarajn, objektivajn kaj raciajn gvidliniojn pri la lingvouzo en la publikaj konsultadoj.

La Komisiono malakceptis la unuan rekomendon. Rilate al la dua, ĝi akceptis la rimarkojn kaj konsentis labori por pli kohera lingvopolitiko okaze de publikaj konsultadoj. La mediaciisto opiniis, ke la Komisiono ne taŭge aplikis la rekomendojn, sed ne insistis, ĉar la eŭropa parlamento ĵus aprobis Rezolucion pri ‘Publikaj konsultadojn kaj ilia disponeblo en ĉiuj EU-lingvoj’.

Roland Rodsaert

La plendo (ref. 640/2011/AN, rete konsultebla je [europa.eu/!FC83bD](http://europa.eu/!FC83bD)), estis pritraktita dum la jaroj 2011-2012. Mi regule ricevas informojn pri eŭropaj konsultadoj kaj plejofte ili estas nur en angla lingvo. Mia konkludo: Ombudsmano kaj Parlamento bone konas la problemon, sed ne kapablas solv(ig)i ĝin.

RR

## SIMPOZIO DE RUMANIA E-ASOCIO

Fine de septembro (tagmeze de vendredo la 26-an ĝis 14.00h en dimanĉo la 28an) okazos la jam tradicia Simpozio de la Esperanto-Asocio de Rumanio (EAR) – la plej proksima evento al nacia kongreso en tiu lando – kaj ili tre ĝojos je pli internacia partoprenantaro. La kunveno situas sur monteta vilaĝa deklivo; temas pri kulturcentro/lernejo moderna, konvena, (tion mi kuraĝas aserti, ĉar antaŭ du jaroj mi partoprenis la aranĝon samloke) kun loĝigo kaj manĝado komuna kaj surloka. Ĝi troviĝas ĉ. 30 km. norde de *Cluj-Napoca* (trajne kaj buse atingebla), kun apuda urbo *Gerla* (kie aktivas lerneja E-grupo). Kostoj estas (laŭ miaj normoj) ekstreme moderaj (€65 por registriĝo, loĝigo kaj ĉiuj manĝoj). Ni scias pri partoprenontoj el almenaŭ du najbaraj landoj – tre eble estos pli. Se iu de pli for decidus partopreni, bv. krome kontakti min (la sopiro je libroj el pli deforaj landoj estas grandega). *Cluj* havas flughavenon kaj stacidomon kun du rektaj trajnoj tage el Budapeŝto; rabatflugoj ekzistas ĝis *Tigru Mures* (ne tro for). Informojn kaj mendilon petu de sinjorino Mariana Berariu ([mariana.berariu@gmail.com](mailto:mariana.berariu@gmail.com)). Laŭeble aliĝu ĝis la 5a de septembro – tiam EAR devas komuniki la partopren-nombron al la ejo.

Stefan MacGill

## IBERIA RENKONTIĜO EN KATALUNIO

La venonta Iberia Renkontiĝo okazos en L'Arboç (Katalunio), la 5an, 6an kaj 7an de septembro. Vidu pli detale pri ĝi: [http://www.esperanto.cat/ir2014/hejmo\\_eo.htm](http://www.esperanto.cat/ir2014/hejmo_eo.htm)  
Endas scii, ke:

- estas senpaga amasloĝejo,
- koncertos No em toques, JoMo kaj verŝajne urba bando,
- la urbaj asocioj ege kunlaboras kaj aktive partoprenas la aranĝon,



- gastigos la renkontiĝon popola [Ateneo de L'Arboç](#)
- estas rekta trajno ĝis L'Arboç

Jen provizora programo:


- Interkonaj ludoj
- Sustrataj fulmlecionoj por neparolantoj de Esperanto
- Prezento de esperantismo al ateneanoj, kaj de atenea organizado al esperantistoj
- Intensiva kurso de Esperanto (3 sesioj po 2 horoj)
- Dubosolvanto: pedagogiaj rimedoj por regi la sufiksojn -ig- kaj -iĝ-
- Prezento de Wikimedia



- Lingvaj ludoj por progresantoj
- Prelegoj
- Debato pri esperantismo kaj pacismo
- Prezento de Valencia Esperanto-Asocio
- Prezento de la unua disko de No Em Toques
- Koncertoj de No Em Toques kaj de JoMo kaj aliaj muzikaj kaj festaj surprizoj fare de la urbanoj

Farri Macip

## TROJA MILITO EN ESPERANTO



Kun granda ĝojo mi prezentas al vi la ĵus eldonitan novan, valoran produkton de la senlaca dum pli ol duonjarcento supera helena esperantisto, Spiros Sarafian, *La Troja Milito* (158 p.). Do, bonŝance, post liaj konataj, ampleksaj verkoj (ampleksa lernolibro, 672 p. - 4-voluma vortaro kun pli ol 80.000 vortoj - tradukoj de Herodoto kaj Platono) li aperigis sian novan verkon en Esperanto. Kiel sciante temas pri vere alloga parto de la tre riĉa helena mitologio, tiom vaste konata en la tuta mondo. Tamen, laŭ la aŭtoro: “*Tiu Troja Milito estas trezoro helena, tamen propraĵo tutmonda, tial ĝi devas esti rakontata ankaŭ en la internacia lingvo, en nia Esperanto*”

La libro estas legata tre facile, agrable kaj plaĉe, ĝi ja estas tre interesa pro la konataj preskaŭ al ĉiuj okazintaĵoj kaj la lingvo estas la simpla, la zamenhofa

Esperanto. La aŭtoro finas sian antaŭparolon jene:

“... do, baziĝante sur la plej certaj rakontoj el la homera fonto pri la ĉefaj okazintaĵoj de la milito, sur la plej vaste akceptataj versioj pri ne ĉefaj okazaĵoj kaj personoj, mi ĉi-sube rakontas ne nur la miton pri la Troja Milito, sed ankaŭ la postmilitan sorton de ties ĉefaj herooj”.

Kore mi dankas mian karan amikon Spiros, ĉar ankoraŭfoje li riĉigis nin per tiu-ĉi nova kultura heredaĵo.

Kostas Kiriakos

## **KAEST-KONFERENCO 2014 EN MÓDRA HARMONIA (SK) - Aplikado de Esperanto en la scienco kaj tekniko**



Se vi ŝatus ekkoni konatajn (kaj rekonatajn) esperantistojn, interesiĝantaj pri aplikado de scienco kaj tekniko de Esperanto – samtempe kiuj ŝatas bonetose pasigi la tempon – indas partopreni la Esperanto-aranĝon "KAEST" en Slovakio.

Jam de longe estas tradicie, ke kelkdeko de pli seriozaj esperantistoj, interesiĝantaj pri la faka aplikado de Esperanto kaj pri la kunligitaj terminologiaj problemoj kunvenas en ĉiu dua jaro en aparta renkontiĝo nomata "KAEST – Konferenco pri Aplikado de Esperanto en Scienco kaj Tekniko" ie en Slovakio, en mezo de Eŭropo.

Kutime ni kunvenas en 60-80 persona societo el manpleno da landoj ekde vespero de ĵaŭdo ĝis tagmezo de dimanĉo, ni aŭskultas 30-40 minutajn prelegojn pri diversaj interesaj sciencaj kaj teknikaj temoj, kaj ni babilas, diskutas pri la kunligitaj terminologio, fakaj esprimoj kaj fakaj vortaroj.

En ĉiu jaro oni havas iun ĉeftemon, kiu ne estas ekskluziva, ĝi ĉefe nur orientigas la temo-elekton de la prelegantoj. Materialoj kaj prelegotekstoj de pluraj malnovaj KAEST-oj estas troveblaj en la Scienc-Teknika Esperanto-Biblioteko, STEB ĉe [www.eventoj.hu/steb/](http://www.eventoj.hu/steb/) kaj prelegoj de la lastaj jaroj haveblas ankaŭ libroforme.

La ĉi-jara kunveno okazos inter 13-16. de novembro en Slovakio, en universitata urbeto MÓdra Harmonia, je 40 km-a proksimeco de Bratislava. La organizanto estas la firmao/societo E@I, kun gvido de Peter Baláž. Ni kolektiĝas ĵaŭde vespere, ni kunestas dum la longa semajnfino, kaj dimanĉe tagmeze ĉiuj reveturas hejmen.

La partopreno ne estas ligita al membreco en iu asocio kaj ne estas ligita al iu aĝo, kutime la plejmulto estas inter 25 kaj 45 jaroj. Oni bonvenigas vin ankaŭ tiam, se vi ne estas specialisto en iu teknika fako, se vi ne volas prelegi, nur aŭkuskulti la aliajn.

Pli detalajn informojn kaj aliĝilon vi trovas en la retejo <http://kaest.ikso.net/> .

Volonte mi renkontus vin ankaŭ persone en KAEST! Ĉu ni renkontiĝos tie?

Szilvási László

## LINGVA JUSTECO laŭ Philippe van Parijs

Ĉu la homaro devas koni multajn lingvojn por interkompreniĝi? Kiuj lingvoj plej taŭgas por efektiviĝi ĉi tiun celon? Ĉu la angla lingvo sufiĉas por la universala komunikado? Jen kelkaj 'klasikaj' demandoj, kiujn Philippe van Parijs starigas kaj diskutas en sia plej aktuala libro pri lingva justeco.<sup>2</sup> La konata belga aŭtoro<sup>3</sup> opinias, ke la homaro ja bezonas iun „lingua franca“ kaj ke tiu plej verŝajne estos, kaj *estu*, la angla lingvo. Haltigi la disvastigan procezon favore al la angla lingvo estus sensenca klopodo kaj erara intenco. Male, la disvolviĝo de ĉi tiu lingvo devas esti aktive subtenata kaj ĉiurilate plirapidigata. Ĉio alia kontraŭstaras la logikon kaj la sanan menson. Sed ĉu la kvazaŭ natura enkonduko aŭ adopto de la angla lingvo kiel „lingua franca“ estas ankaŭ justa solvo? Lingva justeco ekzistus, se por la komunikado ni ĉiuj utiligus la saman lingvon, kiun ni ĉiuj scipovus same bone, ĉar en tiu kazo ni ĉiuj havus la samajn kondiĉojn por bone kompreni unu la aliajn kaj la samajn ŝancojn, ekzemple sur la universaligita, aŭ transnacia labormerkato. Miskomprenoj aŭ tradukeraroj povus esti evititaj, reduktitaj aŭ eliminitaj, kaj ĉiuj mondĉivitanoj povus efike kaj senpere partopreni en la politika vivo kaj ekonomia evoluo. Kvankam van Parijs do pledas en principo por la subteno de tiu 'anglalingva' procezo, kiun oni ne ĝenu, li ankaŭ konscias, ke kvazaŭ trudi iun konkretan lingvon, precipe la anglan, ne signifus aŭtomate pozitivan solvon, aŭ simplan aferon.

En tiu tuta diskuto ne necesas ignori la fakton, ke okdek procentoj de la tuta anglalingva komunikado okazas sen la partopreno de denaskaj anglalingvaj parolantoj. La paradoksa situacio de la tutmonde praktikata angla lingvo estas, ke ĝi estas lingvo grandparte sen nacia popolo kaj sen ŝtato,<sup>4</sup> dum por la plimulto de ĝiaj parolantoj ĝi estas la dua lingvo uzata apud la gepatra aŭ denaska lingvo. De la 1,5 *miliardoj* da parolantoj de la angla lingvo 'nur' 375 milionoj estas denaskaj. Post la angla lingvo sekvas la ĉina kun entute 1,1 miliardoj da parolantoj (inter ili 982 milionoj da denaskaj parolantoj), la hindia (650/460), hispana (420/330), franca (370/79), araba (300/206), rusa (275/165), portugala (235/216), bengala (233/215), germana (185/105) kaj japana (128/127).<sup>5</sup> Iuj ŝtatoj klopodas aktive kontraŭstari tiun evoluon de la rapida disvastiĝo de la angla lingvo, sed kun malgranda sukceso, ĉar praktike en ĉiuj landoj la homoj amase lernas la anglan lingvon, krom aliaj etnaj lingvoj.<sup>6</sup>



Malgraŭ la larĝa internacia disvastiĝo de la angla lingvo, la multlingveco en la mondo probable ne malaperos ankaŭ kun ia tia paralele ekzistanta „lingua franca“, kiel la aŭtoro prognozas. La prioritata utiligo de tia „lingua franca“ povus signifi en la praktiko, ke iuj gravaj temoj estos traktitaj nur en la angla, dum la aliaj lingvoj estos limigitaj al la privata uzado, t.e. al la sferoj de la familio, amikaro, libertempo kaj folkloro.



El *ekonomika* vidpunkto tia solvo eble havas sencon, pensas van Parijs, kvankam ĝi samtempe malriĉigus la homa(r)a kulturon. Eŭropo estus kulture malpli riĉa, se ĝia multlingveco ne plu ekzistus, ĉar la ŝtatoj kaj nacioj ja trovas sian identecon pere de siaj lingvoj.

Malgraŭ tio, ke la lingva plurismo estas bona afero, kiel van Parijs kredas, ĝi tamen ne estas valoro en si mem. Laŭ van Parijs ne indas konservi malgrandajn lingvojn je ĉiu prezo, ĉefe kiam la koncernaj lingvo-komunumoj mem venas al la konkludo, ke ĝia idiomo ne plu estas *financebla* aŭ se aliaj lingvo-komunumoj ne estos pretaj financi alies lingvojn. Eĉ se (aŭ kiam) iu lingvo biologie elmortas, oni devus akcepti ankaŭ tiun realaĵon. Tiuj nekutimaj kaj provokaj ideoj kaj pozicioj de postmodernisma lingvofilozo, kiu serĉas kaj klopodas trovi novajn solvojn por la lingva justeco, eble ŝokos kaj ĉagrenos la lingvo-raĵtistojn. Sed laŭ van Parijs indas kaj necesas kritike, eble eĉ radikale pensi ankaŭ pri tiaj aspektoj de la temo, des pli ke ĝi estas neevitebla. La atendeblaj protestantoj estas konsolataj per la konstato, ke la menciitaj kazoj eble estas bedaŭrindaj, tamen, laŭ van Parijs ili ne signifas maljustaĵon en si mem.


Grava tasko do estas serioze okupiĝi pri la problemo de la lingva justeco mem, ĉar la validan „lingvan ordon“ van Parijs ŝajne pritaksas ĉiukaze maljusta. Kiel dirite, la belga filozofo kredas, ke tiu ordo estus pli justa, se la homoj interparolus per iu komuna lingvo, kiu estas scipovata laŭ egaleca maniero de ĉiuj partoprenantoj. Sed ĉu tia lingvo entute ekzistas, povas ekzisti? La homoj, kiuj jam scipovas la anglan, sendube havas iujn avantaĝojn kompare kun la homoj, kiuj devas unue lerni ĝin, ofte kun enormaj peno kaj tempo-investo. Laŭ van Parijs tio estas esence maljusta („unfair“). Por fari la ordon pli justa („fair“), necesus, inter alie *ekonomie*, senŝarĝi la homojn, kiuj estas devigataj lerni la anglan kiel duan lingvon, kaj zorgi por ke la ŝancoj por la neanglalingva homaro iĝu ĝenerale pli egalecaj. Krom tio, necesus plivalorigi la statuson de la unuaj, gepatraj aŭ denaskaj lingvoj. Do, la sama egaleca lingvo-praktikado por ĉiuj signifus esencan akton de la justeco. Sed kiel atingi pli da justeco? Per kalkuloj, do matematike!

La filozofo-sociologo van Parijs ne estus samtempe ankaŭ bona ekonomikisto, se li ne prezentus plej diversajn kalkuladojn kaj teoriojn (de aliaj teoriistoj) pri la rilatoj inter kostoj kaj utilo de la multlingvismo. Per tiuj (parte eble iom komplikaj kaj tro kompleksaj) kalkuloj (kiujn oni devas atente legi por kompreni) estas antaŭ ĉio farata la provo mezuri la altecon de la kostoj de tia lingva justeco, t.e. oni kalkulas la prezon, kiun iuj lingvo-komunumoj devus pagi al la aliaj, kiuj devas lerni iliajn lingvon, kaj la subvenciojn, kiujn iuj lingvo-komunumoj eventuale rajtus ricevi de aliaj. En tio la ĉefa problemo konsistas kiel *juste* disdividi tiujn kostojn kaj subvenciojn inter la unuopaj lingvo-komunumoj. Kiel unu el la eblaj konkretaj rimedoj por akiri pli da lingva justeco en la mondo van Parijs sugestas inter alie la enkondukon de „lingva imposto“ por anglalingvaj denaskuloj. Sed la sama van Parijs mem dubas pri la seriozece de tia solvo, kiu verŝajne neniel kaj neniam estos realigita, aŭ realigebla. Pli celtrafe estus, laŭ li, malpermesi la sinkronizadon de anglalingvaj filmoj. Sed kiu vere volus pagi tiajn (aldonajn kaj superflujajn) impostojn, kaj kiu dezirus enkonduki tiuspecajn malpermesojn aŭ monpunojn, kiuj kaŭzus nur novajn formojn de diskriminacio por iuj grupoj? Absurdaj ideoj!

### **Pri Esperanto „neŭtrala“...**

Kaj Esperanto? Unuafoje post longa tempo iu signifa lingvo-filozofo de la „ekstera mondo“ dediĉas apartan atenton al Esperanto. Kvankam tio okazas en la sama ĉapitro, kie estas mallonge traktita ankaŭ la projekto „Babelfish“ el la romano *The Hitchhiker's Guide to the Galaxy* (germane *Per Anhalter durch die Galaxis*) de Douglas Adams, Esperanto ricevis

sufiĉe seriozan analizon, el du vidpunktoj: *Neŭtraleco* kaj *facileco*, du centraj valoroj propagandataj de la esperantistoj, kiuj laŭ ili karakterizas ties lingvon.



Kvankam van Parijs ŝajnas tute bone kompreni, kion signifas aŭ kion signifi la neŭtraleco en la kazo de Esperanto, nome ĝia artefariteco kaj ke ĝi estas nenies gepatra lingvo, li kontestas la kredindecon de tiu trajto, aŭ aserto. El lingvistika vidpunkto van Parijs ne povas konsideri Esperanton neŭtrala ĉefe pro tio, ĉar laŭ li Esperanto ne disponas pri la sama grado de distanco rilate al ĉiuj naturaj lingvoj, kiun „artefarita“ „neŭtrala“ lingvo ja devus disponi. Kiel lingvo, Esperanto valoras por van Parijs ne pli multe ol unu plia okcidenta idiomato de la hindeŭropa tipo, provizita ĉefe per latinindaj, ĝermanaj kaj slavaj elementoj. Ĉar Esperanto do estas esence eŭropa idiomato, van Parijs timas, ke la hungaroj, finnoj, estonoj, maltanoj kaj vaskoj, kiuj ne apartenas al hindeŭropaj popoloj, antaŭvideble ne pretus investisian energion en la lernadon de tia „nova eŭropcentrita gimmick-o“, pri la hindoj, ĉinoj kaj afrikanoj oni tute ne parolu. Pri la aserto, ke Esperanto estas nenies gepatra lingvo (kio tamen ne estas tute vera, ĉar jam ekzistas homoj, kies denaska

lingvo estas Esperanto), van Parijs prognozas, ke kelkajn generaciojn post la enkonduko de Esperanto ĝi nepre fariĝos la denaska lingvo de milionoj da homoj, kio ja ne estas la celo de tia lingvo, tiel ke la tuta eksperimento de la kreo de neŭtrala artefarita lingvo devus esti ripetita. Alian problemon de la neŭtraleco kaj praktika sennacieco de Esperanto van Parijs vidas en la cirkonstanco, ke neniuj ŝtato – kaj la mondo ankaŭ en estonto konsistos el naciŝtatoj – sentus sin respondeca decidi pri kiel tia lingvo, kiu apartenas al neniuj, estu utiligata kaj instruata, kiel ĝiaj normoj, gramatiko kaj leksiko estu reguligitaj kaj kiel ĝiaj reguloj reformitaj, ekzemple laŭ la modelo kiel Francio procedas kun la franca lingvo. Alia aspekto de la neŭtraleco koncernas la demandon de la deviga lernado de tia artefarita lingvo. Sendube, ankaŭ ĉi-rilate aperus nova (socia) malekvilibro, ĉar antaŭvideble unu parto de la homaro, precipe la intelektaj tavoloj, pli facile lernus kaj adoptus tian idealisman lingvon ol la pli malkleraj kaj izolitaj amasoj pro la manko de kondiĉoj, kiuj farus ĝian lernadon sukcesa.

### ... kaj „facila“

Enkonduke al la alineo pri la laŭdira facileco de Esperanto, van Parijs sendube vidas la potencialon de la relativa lernfacileco de Esperanto, kiu koincidas en principo kun la esenca kriterio de la *efikeco*, eĉ en komparo kun la angla lingvo. Van Parijs eĉ pretas koncedi, aŭ konfesi, ke la lernado, aŭ enkondukado de Esperanto kaŭzus malpli altajn kostojn (kiel lia kolego F. Grin modele klopodis „pruvi“). Ankaŭ van Parijs konstatas, ke Esperanto havas „aparte malkomplikitan rilaton inter la parola kaj skriba formoj“, kompare kun la naturaj lingvoj, kiuj havas konservemajn ortografiojn aŭ al kiuj mankas la skribo. Krom tio, li agnoskas la regulecon de la sintakso kaj morfologio, kiuj ne konas esceptojn kaj kiuj estas multe pli facile lerneblaj ol la reguloj de la naturaj lingvoj kompare kun ties abundaj esceptoj. Sed malgraŭ tiuj plusoj kaj pozitivaj, kiuj havigas al Esperanto certajn avantaĝojn kun la naturaj lingvoj, van Parijs ne kredas, ke la lernado de Esperanto sume estos pli facila, pro diversaj kialoj, kaj eble en iomete alia senco. La punktoj, kiujn li mencias, estas la (relative

longa) daŭro ĝis la perfekta scipovo de tia lingvo kaj la flekseblo de la Esperanto-vortoj, kiujn van Parijs ne pritaksas sufiĉe granda. Kvankam van Parijs evidente konas la originalecon de la sufiksa sistemo de Esperanto, kiu permesas tre produktivan vortderivadon, li opinias, ke la relative longaj kungluaĵoj de la Esperanto-vortoj ne povas konkurenci kun la malpli longaj formoj en aliaj lingvoj (precipe angla, kiu grandparte konsistas el unu- kaj dusilabaj vortoj). Do, laŭ li la ŝajna facileco de Esperanto estas trompa, ne pli ol propaganda truko.

Alia kritikpunkto notita de van Parijs koncernas la vorttrezoron de Esperanto, kiu devus kapabli grandstile vastiĝi, se tiu lingvo volus taŭgi por la utiligo en plej diversaj kunteksto. Van Parijs ne povas imagi, ke la nuna stato de la lingvo Esperanto, kiu estas praktikata precipe de hobiuloj en la libertempo, taŭgas por la „vivanta amasa interkompreniĝo“. Van Parijs antaŭvidas, ke la Esperanto-vortaroj de la estonteco estos same ampleksaj kiel tiuj de la naciaj lingvoj. Do, la pli grandan morfologian kaj leksikan simplecon de Esperanto van Parijs konsideras kiel nurajn portempajn avantaĝojn, same la neŭtralecon kaj la relativan lernfacilecon de Esperanto rilate al aliaj lingvoj.

### Didaktiko de la lingvo-lernado

Eĉ pli grava diskut-punkto koncernas la didaktikon, t.e. la modernan manieron lerni kaj instrui lingvojn, kiu laŭ la pritakso de van Parijs ne konformas la bezonojn en la kazo de Esperanto. Dum Esperanton oni grandparte lernas kaj instruas laŭ la eksmodaj metodoj de la antaŭa jarcento, la modernaj naturaj lingvoj estas lernataj kaj instruataj de la homamasoj pere de modernaj teknologioj, ekzemple radio, televido kaj interreto. Lerni fremdan lingvon estas esenca demando de la motivacio, precipe por junaj homoj, kiel van Parijs emfazas. La decidaj kriterioj por lerni fremdlingvon ne plu estas la demando, ĉu la gramatikaj reguloj estas facile lerneblaj aŭ ne, sed ĉu iu lingvo, eĉ malfacila, estas reale utiligebla kaj aplikebla en certaj konkretaj situacioj, en kiuj homoj troviĝas, kaj kiu lingvo estas bezonata por kompreni la ĉirkaŭaĵon. Sendube, van Parijs agnoskas la fakton, ke ankaŭ Esperanto povas esti utila kaj necesa lingvo – precipe en la Esperanto-movado mem. Por utiligi la gigantan potencialon, kiun naturaj lingvoj provizas, multaj homoj ne longe pripensas por decidi kian lingvon indas lerni, ĉu naturan aŭ artefaritan. Konklude, la motivacio kaj la decido lerni fremdlingvojn ne dependas de ideologiaj kriterioj kiel *neŭtraleco* kaj *justeco*, eĉ ne de la *facileco*, sed unuavice de praktikaj valoroj kiel la *utileco* kaj *efikeco*, kiujn multaj homoj preferas. Do, la „modelo Esperanto“, kiu estas ideologia modelo, verŝajne eksmodiĝis, eĉ se ĝi estas pli facila kaj pli neŭtrala.



Do, eĉ se la enkonduko de la angla lingvo kiel „lingua franca“ ne aŭtomate signifus pli justan aŭ neŭtralan solvon, kaj eĉ se oni povas koncedi al Esperanto certan gradon de justeco („fairness“) kompare kun la angla lingvo, ĉi tiu avantaĝo, per kiu Esperanto impresas unuarigarde, laŭ van Parijs rapide ŝrumpus, se oni submetus Esperanton al pli profunda analizo. Precipe el la vidpunkto de la efikeco kaj pro la aliaj menciitaj praktikaj kialoj Esperanto ne povus konkurenci kun la naturaj lingvoj. La efikeco de la angla lingvo kreskas de tago al tago kun ĝia pli kaj pli forta disvastiĝo, dum la efikeco de Esperanto estas tre modesta, ĉar mankas sufiĉa kvanto de parolantoj. Ĉe la angla lingvo neniam rolis la konsidero, ĉu ĝi estas pli neŭtrala aŭ pli justa (fair), sed ĉu ĝi estas pli efika ol aliaj lingvoj. Jen parolas la ekonomikisto, kiu konsideras la „fairness“-argumenton bazitan sur la neŭtraleco malforta. La handikapoj de Esperanto eble



estus forigeblaj, se la internacia komunumo decidus rigore agi favore al la adopto de tia lingvo. Sed por ĝia favorado kaj subteno mankas la internacia (politika) interkonsento.

Spite al tiuj limigoj, por la projekto de artefarita lingvo ne ĉio estas tute perdita. Krom la apliko de Esperanto en iu socia movado van Parijs vidus en principo ankaŭ ŝancojn en aliaj sferoj. Li mencias ĝian eblan rolon kiel pontan lingvon ĉe la tradukado aŭ kiel „ege bonvenan okazon“ por „korekti la okcidentan lingvan superpezon“ („francan-germanan-anglan“), kiu aperis en Eŭropa Unio post ĝia plilarĝigo en 2004. Kompreneble, EU havas sian propran lingvopolitikon, en kiu Esperanto ŝajne povas havi nenian lokon. Sed pri la ebla utila rolo, kiun Esperanto tie povus ludi, unue devus esti konvinkitaj la „burokratoj“ kaj „kapitalistoj“. Kun ĉiu respekto por Esperanto, van Parijs opinias samtempe, ke kiel „alternativa eŭropa aŭ mondvasta komunika rimedo Esperanto tamen ne promesas pli bonan rezulton ol ajna inteligenta softvaro“.

Kiu faras tian aserton, tiu tamen ignoras la meritojn de Esperanto kiel literatura lingvo. Ekzemple la disponeblaj tradukmaŝinoj daŭre liveras tro nekvalifikitajn solvojn, dum lertaj Esperanto-parolantoj, da kiuj bedaŭrinde ekzistas tro malmultaj, tamen kapablas liveri sufiĉe altnivelajn lingvajn rezultojn. Ne la lingvo Esperanto mem estas la problemo, ĉar ĉi tiu lingvo estas plene funkcipova, ankaŭ sur pli alta esprima nivelo. La ĉefa problemo de Esperanto estas, ke en ĝi ne ekzistas sufiĉe da utilaj kaj altnivelaj produktoj, kaj ke ĝia rolo estas reduktita al propagando, turismo kaj hobia uzado, dum la kulturaj kaj intelektaj flankoj estas neglektataj. Laŭ mia opinio, la esperantistoj do grandparte mem kulpas pri ĉi tiu situacio.

Andreas Künzli

<sup>1</sup> Originale la libro aperis en la angla lingvo (*Linguistic Justice for Europe and for the World*. Oxford University Press 2011) kaj estis nun ankaŭ tradukita al la germana lingvo (*Sprachengerechtigkeit - für Europa und die Welt*. Suhrkamp Berlin 2013). Enhavtabelo de la libro: <http://www.ub.unibas.ch/tox/IDSBB/005639911/PDF> (angla), <http://d-nb.info/1028542666/04> (germana).

<sup>1</sup> Philippe van Parijs, naskita en 1951 en Bruselo (Belgio), studis filozofion, juron, politikan ekonomikon, sociologion kaj lingvistikon en la universitatoj de Bruselo, Loveno, Oksfordo, Bielefeld kaj Berkeley (Kalifornio) kaj doktoriĝis pri sociaj sciencoj (Lovenio 1977) kaj filozofio (Oksfordo 1980). Li laboras kiel profesoro en la Fakultato pri ekonomiko, sociaj kaj politikaj sciencoj de la Lovena Universitato, kie li gvidas la Hoover-katedron pri ekonomiko kaj sociala etiko ekde ĝia fondiĝo en 1991. Krom tio, li docentis en Harvardo kaj Oksfordo kaj gastprofesoriĝis ĉe universitatoj en aro da landoj (Nederlando, Italio, Francio, Hispanio, Usono, Kanado, Urugvajo, Brazilo, Rusio, Ĉinio, Kongo). Van Parijs estas membro de la Brita Akademio kaj membro de la Belga Reĝa Akademio de la Sciencoj, Literaturo kaj Belartoj kaj de la Eŭropa Akademio de Artoj kaj Sciencoj. Li membras en la eldonistaj estraroj de pluraj fakrevuoj pri filozofio, publikaj aferoj, politika filozofio kaj ekonomiko, politika kaj etika teorioj kaj morala praktiko, evoluo de la multlingvismo kaj multkultureco, egalisma teorio kaj politika praktiko, aplikata filozofio, filozofio ekonomika k.a. Pri tiuj kaj aliaj temoj van Parijs verkis nemalmultajn librojn kaj artikolojn. Krome, van Parijs fariĝis konata kiel fondinto de la Eŭropa Reto pri Baza Enspezo (aŭ Salajro, bien), kiu organizas ĉiujaran Etikan Forumon. En 2001 li ricevis la Premion 'Francqui', la plej prestiĝan sciancan honorprezon de Belgio, kaj en 2011 la 'Arkprijs' 'voor het Vrije Woord', kiu estas jara premio celanta honori publikajn personecojn, kiuj emfazas la signifon de la libereco de la parolo. En 2007 la belga poŝto dediĉis poŝtmarkon al lia honoro pro lia ĝenerale akceptita statuso kiel elstara erudiciulo de Belgio. (Fonto: <http://www.uclouvain.be/en-11688.html>).

<sup>1</sup> La angla estas la oficiala lingvo nur en jenaj landoj, vd. [http://en.wikipedia.org/wiki/List\\_of\\_official\\_languages#E](http://en.wikipedia.org/wiki/List_of_official_languages#E).

<sup>1</sup> Tiujn ciferojn mi transprenis de <http://www.weltsprachen.net>, kiuj ŝajnas al mi pli aktualaj ol tiuj, kiujn van Parijs indikis surbaze de Ethnologue.

<sup>1</sup> Ekzemple en francaj universitatoj aperis protestoj kontraŭ la enkonduko de la angla kiel lingvo por prelegoj. Kontraŭanglaj emocioj ekzistas precipe ankaŭ en Germanio, Ruslando k.a.

<sup>1</sup> La angla vorto „gimmick“ povas signifi gagon, reklamtrupon, kuriozan ideon, ludajon, k.s. Pri la signifo(j) de tiu vorto vd. la diversajn vortarojn.

**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**

**Finredaktita: la 31-an de aŭgusto 2014**

**Redaktoro:** Zlatko Tišljár

**En la numero kunlaboris:** Flory Witdoeckt, Roland Rotsaert, Stefan MacGill, Farri Macip, Kostas Kiriakos, Szilvási László, Andreas Künzli, Zlatko Tišljár

**Kontakto:** [ztisljar@gmail.com](mailto:ztisljar@gmail.com)

**Retpaĝo:** <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

